

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Aŭtuno 2016 - £2.50/€3



Enhavaj Elstaraĵoj – Celebro de Vivo de Paŭlo Gubbins – Pordo
al Miraklo far Simon Varwell – Heroinoj kaj Heroinoj de John
Francis

Esperanto en Skotlando

Numero 204 - Aŭtuno 2016 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuaĵojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 31a de marto 2017**. Oni sendu kontribuaĵojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

El Katedro.....	3
Paŭlo Gubbins – The Jolly One With the Beard.....	8
Nitrogeno.....	14
Ekzercoj el la Sabatrondo 2016.....	27
La Landlimaj Fervojo.....	32
Heroinoj kaj Heroinoj.....	34
Pordo al Miraklo.....	37
Solvoj de la Ekzercoj.....	42
Kalendaro.....	44

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Ed Robertson

Vic-Prezidanto: Hju Rid

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,

Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

Fronta bildo: bela interno de la preĝejo Broughton St Mary's kie okazis la ĉi-jara Sabatrondo

El Katedro

Ĉu Esperanto havas „celon”? Se jes, eĉ se povas esti diskutado pri la esenco de tiu celo, oni povas almenaŭ parte trovi tiun celon en internacia vojaĝado. Ĉi-somere okazis tre sukcesa Universala Kongreso de Esperanto en Nitra en Slovakio kun pli ol 1200 aliĝintoj, kaj ĉeestis ĝin ankaŭ kelkaj homoj el Skotlando. Mi ne ĉeestis tiun aranĝon, tamen mi almenaŭ kuraĝigis homojn viziti Slovakion dum mia prelego en la glasgova e-klubo kun bildoj de vizito al la esperanta aranĝo „Somera Esperanto-Studado” kiu okazas regule en Slovakio kaj kiun mi ĉeestis en 2015.

Se vi ne ĉeestis grandan Esperanto-aranĝon ekster Skotlando, eble vi nervozos, ke vi neniun konas, kaj eble demandos al vi, ĉu via lingvo-nivelo sufiĉas. Laŭ mia sperto, internaciaj Esperanto-kongresoj enhavas homojn je ĉiuj lingvoniveletoj, kaj ĉiaokaze, esperantistoj estas ĉiam ege bonvenigaj kaj afablaj, dum rilate al la lingvaj aferoj, vi certe elturniĝos.

Mi iris, tamen, ĉi-jare al la banurbo Birŝtonas en Litovio, por ĉeesti la eventon **52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, kiu havis pli ol 330 partoprenantojn, kaj okazis dum 8 tagoj komence de julio. Mi antaŭe ĉeestis tiun saman aranĝon antaŭ tri jaroj, kaj mi sciis, ke mi certe spertos bone organizitan aranĝon, kun bunta programo de frumatene ĝis malfrue en la nokto, interesaj ekskursoj, organizitaj kaj neformalaj koncertoj, tri manĝojn tage kaj komforta tranoktado kontraŭ modesta kosto. Kaj antaŭ ĉio, multe da agrabla babilado kaj amuzado kun interesaj homoj el Litovio kaj preskaŭ 30 aliaj landoj. Miaj atendoj certe denove plenumiĝis.



Mielvin-gustumado (po 5 glasoj) ĉe Baltiaj Esperanto-Tagoj



Ed en Litovio kun kongresanoj el Pakistano, Pollando kaj Ĉinio

Pli poste dum la somero estis aldone mia plezuro ĉeesti la **Duan Tutkeltan Esperanto-Kongreson**, kiu okazis dum la mezo de aŭgusto samtempe kun la **20aj Internaciaj Pluezekaj Renkontiĝoj** en la agrabla bretona vilaĝo Plouézec. Ĉeestis pli ol 120 Esperanto-parolantoj el diversaj landoj, kiuj ĝuis tutan semajnon da prelegoj, kursoj, ekskursoj, koncertoj kaj kunestado. Pluraj el la klasoj celis plibonigon de Esperanto-kapabloj, aliaj rilatis al muziko, kaj arto. Mi partoprenis klason pri la historio kaj lingvoj de la keltoj, kiun gvidis Kimro, Bill Chapman, kaj mi mem faris prezenton pri la Piktoj kaj ilia lingvo.



Kongresanoj kolektiĝas en Plouézec



EAS-Kasisto David Hannah ĉe la 2a Tutkelta Kongreso

Miaj Esperanto-ekskursoj por la somero/frua aŭtuno ĵus kompletiĝis, ne kun kongreso, sed kun la nuptofesto de Francesco Maurelli kaj Sara Spanò en la itala vilaĝo Castel Gandolfo, tradicia somerloĝejo de la papoj. Ili antaŭe estis aktivaj membroj de la Esperanto-Asocio de Skotlando kiam ili loĝis en Edinburgo dum pluraj jaroj. Kaj la nuptofesto estis kvazaŭ (almenaŭ parte) Esperanto-aranĝo, kun multaj esperantistoj inter la pli ol 200 gastoj el 29 landoj, inkluzive de pluraj el Skotlando.



Francesco kaj Sara

Tamen, kien venonte? Estas Esperanto-kongresoj ĉie en la mondo. Venontjare la Universala Kongreso estos en Sud-Koreio de la 22a ĝis la 29a de julio 2017. La Baltiaj Esperanto-Tagoj estos en 2017 en Latvio, en la agrabla apudmara urbo Liepaja de la 1a ĝis la 8a de julio. Unu certa allogaĵo por mi estas ankaŭ la venontjara (84a) Itala-Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la mirinda mondfama historia urbo Matera en la suda provinco Basilicata (26a de aŭgusto ĝis 2a de septembro 2017). Ĉu oriente aŭ okcidente, ĉiu Esperanto-parolanto ĉie povas trovi geamikojn. **Kaj kompreneble, ne forgesu nian kunan kongreson de EAS kaj EAB en Edinburgo de la 19a ĝis la 22a de majo 2017.**

Ed Robertson

Paŭlo Gubbins – The Jolly One With the Beard

La dolĉo de la biero Jaipur India Pale Ale plenigis la buŝon. Ĝi trafluis plaĉe la gorĝon kaj per, postaj aromoj de floraj lupoloj kaj mielo, ĝojigis la odorosentojn.

La kantoj de anĝeloj preskaŭ tiklis la orelojn!

Mi sidis en la trinkosalono de la gastejo Queens Head Hotel en la distrikto Mossley, parto de Congleton. La malsaton mi jam kontentige pacigis per bongusta bifteko kun pipra saŭco. Antaŭ tiu mi trinkis pajnton de Joule*, loka biero de la stilo hinda pala elo. Ĝi estis tre bongusta. Akompanis mian manĝon pajnto de la biero Black Sheep, kiun mi jam renkontis kaj ŝate ĝuis dum Somera Festivalo en Barlaston. Sed la elo Jaipur plenplene superis tiujn du bonegajn bierojn.

La manĝon mi prenis ekstere en belaspekta ĝardeno en preskaŭ somere varma vespero, sed venis enen al la trinkejo kiam la suno komencis malaperi malantaŭ ĉirkaŭaj domoj. Tiam mi renkontis la bieron Jaipur dum mi daŭrigis legadon de interesa sciencfikcia libro – *Singularity Sky* far Charles Stross – sidante komforte en la amikema atmosfero de la trinkejo. Ĉirkaŭis min trankvile babilantaj Angloj kaj frontis min aro de kranoj de diversaj ‘metiaj bieroj’** inkluzive la ĉielgustan Jaipur.

Entute mi pasigis ĝuindan vesperon antaŭ enlitiĝi en moderne renovigita dormoĉambro en la apuda restadejo kun la gusto de biervarioj ankoraŭ en la memoro. Nu, nur tri pajntoglasojn da, tamen, mi trinkis dum la tuta vespero ĉar la morgaŭan tagon mi ĉeestos la Celebron de Vivo de nelonge forpasinta Paŭlo Gubbins.

Se ŝajnas tro malserioze mia enkonduko al tia ĉi artikolo, mi kredas ke estas enorde ĉar fakte tiu tute kongruas kun la etoso de la Celebro la sekvan tagon. Mi konis Paŭlon pro multaj renkontoj

dum esperantaj eventoj en Skotlando, en Anglio, kaj foje eksterlande dum Universalaj Kongresoj. Intertempe, kompreneble, li ekzistis nur en mia memoro, kvankam la mencio de lia nomo sufiĉe oftis ĉar li estis tiel grava homo en la brita kaj tutmonda movadoj. Do kiam mi eksciis ke li mortis, post la unua ŝoko kaj malkredo, li ŝajne daŭris ekzisti en mia propra memoro same kiel li ekzistis por mi dum li vivis.

Kaj supozeble io simila estis la intenco de la familio kaj la organizinto de la evento en Mossley Village Hall la 19an de aŭgusto 2016. La familio jam en la mateno travivis la malfacilan parton de la tago en la kremaciejo, la tristan servon, la adiaŭon. Sekve, tiu ĉi posttagmeza evento vere estis Celebro de Vivo. Ĉirkaŭis sur la muroj dekoj da fotoj de Paŭlo kun multaj homoj kiuj konis lin. Tablo apud la pupitro estis kovrita de tasegoj plej ŝatataj de Paŭlo. Sur alia tablo multaj plastaj ranoj kiujn li kolektis dum la jaroj, kontentigantaj lian knabecan amuzemon.

Dum la paroladoj far tiuj, kiuj konis lin oni povis kvazaŭ senti lian subridantan ĉeeston – kiel daŭre restanta rideto katega. Fakte, Jill Gubbins, la filino de Paŭlo, rakontis pri konversacio inter du novaj studentoj unu el kiuj hastis al leciono farota de Paŭlo. Kiam la alia demandis al kies klaso la unua iras, tiu respondis ‘Mi ne memoras ankoraŭ lian nomon sed li estas la gaja kun la barbo’

The jolly one with the beard.

Paŭlo mem diris ke li deziras esti memorata per tiuj vortoj kaj ĝuste tiel skribiĝis la devizo sub lia foto sur la fronta paĝo de la celebra tagordo.

Inter tiuj kiuj parolis – najbaroj, muzikamantoj, amikoj, familianoj

kaj kolegoj – prezentis lian Esperantan vivon nia Tim Owen. Li rakontis al ni kiel ekscitita Paŭlo estis ĉar li eksciis ke li fariĝos avo. Li simple ne povis enteni la novaĵon kaj, kvankam li sciis ke li ne devis, informis siajn proprajn amikojn antaŭ ol eĉ la filino informis siajn. Tia estis Paŭlo. Tim jam verkis [bonegan kaj legindan nekrologon](#)*** pri Paŭlo por Libera Folio, kiu enhavas multajn detalojn pri lia vivo, inkluzive tiun pri lia nova ek-aviĝo.

La ceremonio estis bone kondukata. Muziko – ‘La Truta Kvinteto’ de Franz Schubert – ludiĝis dum homoj alvenis en la vilaĝan halon de Mossley. Tiu kune kun ĉiuj muzikaĵoj ludotaj dum la celebropostis plej ŝatataj de Paŭlo mem. Donna Lear, humanista celebrantino, malfermis la eventon kaj enkondukis parolantojn unu post la alia – Keith Whittaker, dumviva amiko; Tim Owen, amiko kaj Esperantisto; David Messham, amiko kaj muzikisto; Paul Dentith, amiko kaj najbaro kies vortojn laŭtlegis por li la celebrantino; familianoj – la kuzino kaj la filino – ankaŭ parolis. Inter eroj ni aŭskultis interludojn, kiuj provizis ne nur muzikan ĝuon sed ankaŭ oportunon por amuzo. Pro hazarda aranĝo de la ĉambroj de la halo la regilo de la sonluda sistemo situis en angulo de la kuirejo iom for de la pordo kondukanta al la ĉefa ĉambro. Tial la kompatinda viro kies tasko estis ŝalti la muzikon je la ĝusta momento devis stari en la pordo por ricevi la signalojn de Donna Lear kaj poste kureti al la aparato. Li ne povis stari preta ĉe la aparato ĉar tie li ne povis vidi nek aŭdi la celebrantinon. Konsekvence, la interludoj komenciĝis ĉiam tro frue aŭ tro malfrue, aŭ daŭre rulis al la sekva planita ero, aŭ ludiĝis multe tro frue, aŭ sonis plena silento. Homoj ridis, tute senmalice kompreneble, nur pro amuzo, kaj mi aŭdis ĉirkaŭ mi multajn flustrojn ‘Ho, kiel Paŭlo ankaŭ ridus!’

Mi aŭdis multon pri Paŭlo kion mi jam ne sciis – li estis tre bona ludisto de saksofono kaj anis en tri apartaj amatoraj ĵaz-grupoj; li amegis la muzikon de Gilbert kaj Sullivan; li amis kaj havis

enciklopedian scion pri fervoj kaj la koncernaj maŝinoj kaj aliaj inĝenieraj aparatoj; kaj li estis entuziasma amanto de bona biero!

Antaŭ la fino, Tricia Budd laŭtlegis en la dialekto de Lancashire la plej ŝatatan poemon de Paŭlo, 'The Lion and Albert', poemo kiun Paŭlo nomis 'vera poezio'. Kompreneble ĝi estas neniel serioza. La reago de la gepatroj de Albert kiam leono manĝas la fileton dum vizito al bestoĝardeno estas tute malprobabla, kaj tial ridiga -

Then Pa, who had seen the occurrence
And didn't know what to do next
Said, "Mother! Yon lions 'et Albert"
And Mother said "Eeh, I am vexed!"
So Mr and Mrs Ramsbottom
Quite rightly, when all's said and done
Complained to the Animal Keeper
That the lion had eaten their son.

Post konkludaj vortoj de Donna Lear ni ĉeestantoj havis okazon manĝi frandaĵojn kaj trinki teon – kvankam iujn kuncelebrantojn mi vidis kun pajnto da biero en la mano. Mi mem ne povis biertrinki tiun momenton ĉar mi veturigos hejmen aŭtomobile tuj post horo – sed mi ja scivolis de kie tiuj ekhavis bieron.

Kompreneble mi gravitumas, kiel oni ĉiam faras en tia medio, al la homoj kiujn mi bone konas. Esperantistoj ĉeestis, kiel atendite, kaj mi babilis kun tiuj – Graham Blakey, Tim Owen, Malcolm Jones, kaj Miland Joshi. Aliaj ĉeestis – Ian Carter, Terry kaj Anica Page, kaj Colin Simmonds – kun kiuj mi ne havis tempon babili. Mi ne povis, pro tio ke mi ankoraŭ ne parolis kun ne-Esperantistoj, diveni la senton de la ĉeestantoj, sed ŝajnis al mi ke homoj ne estis mornaj,

ke la paroloj ĵus aŭditaj, la pensoj kaj la memoroj amaj pri Paŭlo tiel vokitaj en la mensojn levis la spiritojn de homoj. Ties vizaĝoj ja portis la esprimojn de homoj kiuj celebras iun bonan.

Kvankam estis ĝue por mi paroli Esperanton kun bonkoraj homoj, pro la jam malfrua horo – frontis min kvin-hora aŭtomobila vojaĝo hejmen – mi devis lasi tiujn por transdoni salutojn kaj dezirojn el Skotlando al la familio.

Mi renkontis Jill Gubbins ĉe la pupitro. Ni interŝanĝis bondezirojn reciprokajn kaj dividis memorojn pri Paŭlo. Inter multaj kiujn mi havis mi menciis precipe la sperton aŭdi lin prelegi en Dunblane pri sia amata “Mossley Light Railway”. Mi konfesis al ŝi ke kiam mi envenis en la prelegĉambron kaj vidis sur la ekrano lumbildon de pupaj figuroj, ĉiuj kun nomoj, mi atendis mal-antaŭĝue tro frivolan, eĉ infanecan, kaj do tedan por mi horon. Sed fakte la malo okazis. Paŭlo tiel interese klarigis ĉiun defion de la inĝeniera projekto kun bildoj de ĉiu etapo de la progreso, ke mi, kaj supozeble ankaŭ la aliaj aŭdintoj, estis tirataj sorĉe en la mondon de Mossley Light Railway. Je la fino mi sopiregis de Paŭlo pli da rakontoj pri lia fervojeto. La sukceso estis laŭdo ne nur al la entuziasmo de Paŭlo pri sia projekto sed ankaŭ al lia kapablo kiel rakontisto.

Dum ni du babilis, alvenis virino kiun Jill prezentis al mi kiel Sandie. Ŝi estas la kantistino de unu el la ĵaz-grupoj en kiu Paŭlo ludis saksofonon. Sciinte tion mi demandis ŝin pri amuza noveleto verkita de Paŭlo kiun mi legis. Temas pri grupo de amatoraj ĵazludistoj kiuj renkontis iun someran vesperon por ludi kune. Estis terure varme kaj humide en la kunvenĉambro, kaj la ĵazistoj sentis sin malkomfortaj. Oni komencis demeti vestojn dummuzikume, kaj finfine – post hezيتeta demeto de la honto – ĉiuj ludis la muzikon tutnude. Sandie ridis kaj respondis ke tio neniam okazis! Mi kredas ŝin absolute – sed la fikcio de Paŭlo vere estis amuza.

Dum la babilado kun Jill, leviĝis la temo de biero. Mi diris al ŝi ke estis surprizo por mi malkovri ke ŝia patro estis amanto de biero, kiel ankaŭ estas mi. Mi informis ŝin ke mi ĝuis bonajn en la taverno Queens Head kie mi tranoktis la pasintan tagon, kaj demandis, pro tio ke ĝi situas tre proksime, ĉu Paŭlo iam trinkis tie. Ŝi respondis ke sendube, jes.

Ho, ve! Se nur mi estus menciinta lian nomon al iuj el la aliaj trinkantoj mi certe estus ĝuinta bonegan konversacion pri li kaj liaj ŝatataj bieroj.

Tamen ne valoras bedaŭri nefaritaĵojn. Mi ja spertis vesperon de gustoplezuro en konvena trinkejo kaj plaĉas al mi pensi ke iel en iu humanista ĉielo Paŭlo akompanis mian trinkadon de la anĝelaroma Jaipur kaj levis glason da ĝi je-mia-sane!

Hju Rid

** Antaŭ multaj jaroj profesoro de fiziologio kaŭzis ridojn en lekcsalono de la universitato de Dundee per sia prononco de la energia unuo 'joule'. Li diris 'ĝaŭl' kaj poste klarigis ke la fama fizikisto James Prescott Joule naskiĝis en Lancashire, kaj tiel oni prononcas ties nomon. Joule estis mem bierfaristo kaj la nuna farejo apartenas al la posteuloj de la sama familio. Pro mia vizito, mi povas konfirmi ke en la trinkejo tiun vesperon mi ja aŭdis unu el la lokuloj peti de la servisto pajnton da ĝaŭl!*

*** Angle: craft beer.*

**** Vidu ĉi tie por plena nekrologo pri Paŭlo: <http://www.liberafolio.org/2016/forpasis-paul-gubbins-la-cefredaktoro-de-monato>*

Nitrogeno

“Ho mia Dio, ho mia Dio, ho mia Dio, ho mia Dio. Estis mirinde. Vi estis mirinda! Ho mia Dio. Mi amas vin. Ho mia Dio, mia Dio, mia Dio. Mi ne imagis ke ĝi estus tia. Nur unu vorto kaj vi venis al mi. Vi prenis min. Tiel simple. Ho mia Dio, mia Dio.”

Pastro Allan Sanders estis en la estrarĉambro de Fluorsene Inc kiam li vidis ŝin por la unua fojo. Ĉirkaŭ la muroj staris malaltaj tirkestaroj el hela kverkoligno. Montraĵ ŝrankoj enhavis industriajn premiojn kaj malaktualajn promociajn materialojn por Fluorsene Inc. Sur la muro apud la ekstremaĵo de longa tablo el polurita kverko pendis granda videkrano. Ĝi montris senmovon el laboratoria teĥvideo. Georgo Radcliffe ĵus kondukis lin en la ĉambron kaj indikis du seĝojn ĉe la ekstremaĵo de la tablo. Pastro Sanders supozis ke Radcliffe serĉis tiun ĉi punkton en la teĥvideo antaŭ ol li alvenis.

“Ĉu tiu estas Sophie?” li diris, kapklinante al la sceno sur la ekrano.

Junulino surportanta hospitalan robon genuis sur lito kaj rigardis supren. Ŝi tenis la brakojn for de siaj flankoj. Ŝia vizaĝo montris mikson de kontento kaj ĝojo, la buŝo malfermita, la lipoj en rideto. Pastro Sanders sciis ke li estas trompebla pro belaspekto, eĉ kiel ĉastfraŭlo, sed ne nur la aminda vizaĝo frapis lin. La sento markita sur ŝia vizaĝo venis el profundo interne. Ĝi estis kompleta. Kiam li vidis ŝin la lastan fojon, sur la sama lito en hospitala robo, ŝi surportis la saman esprimon, sed tiun fojon ŝiaj lipoj bluis.

“Jes. Nu, hm, ĉu plaĉus al vi kafo?” diris Radcliffe. “Ni povos paroli kaj poste mi ludos la observon.”

Sanders kapjesis.

Radcliffe, kun aroganta paradpaŝo, levis ŝtalan kafujon desur pleto sub la videkrano kaj verŝis du tasojn dumparole.

“La Eklezio tre interesiĝis pri nia laboro dum la pasintaj jaroj, Pastro, kaj niaparte, ni estas kontentaj dividi niajn eltrovojn. Ni stumble-hazarde trovis drogon antaŭ kelkaj jaroj – Deopidem, ni nomis ĝin – kiu nedistingeble reproduktas mistikan unuiĝon. Ni evoluigis ĝin ekde tiam. Mi supozas, tamen, ke Episkopo Galloway klarigis ĉion ĉi.”

“Ne, li ne. Ne lia stilo.”

Radcliffe donis al li la kafon kaj sidiĝis.

“Nu, ĝis nun la efikoj estis provizoraj. Post kelkaj horoj la konscio de la subjektoj revenas ĝis normalo. La tuja post-efiko tamen estas rimarkinda. Subjektoj inspiroas al virto, bonaj agoj, kaj al pento pro pasintaj misfaroj. Kiam la efiko velkas, ili spertas nenian narkotomankon. Ili volus resperti ekstazon – nu, kiu ne? Sed, ĝis nun, neniu postulis ke ni redozu tiun, kaj neniu provis mem akiri la drogon.”

“Sed Sophie estas alia?” Pastro Sanders diris.

“Fraŭlino Arnaud tute samas. La drogo malsamas. Ŝi estas la unua el niaj voluntuloj kiu provis la plej novan formuligon – Pro-Deopidem. Oni desegnis ĝin ke ĝi estu pli pova ol la fruaj versioj kaj, hm, pli longedaŭra. Tiu dua eco estas, efektive, la kialo por nia peto renkonti vin.”

“Kial? Kaj, kial min?”

“Nu, tial ke niaj kalibrigoj estis misaj. Ni ne atendis, tio estas, mi volas diri ke – ekde kiam ni donis Pro-Deopidem al ŝi la efikoj ŝajnas esti permanentaj. Fraŭlino Arnaud estos mistikulo la tutan vivon.”

“Kara Dio! Kompatinda ulino.”

Radcliffe ridis.

“Ne, mi estas serioza. Ĉu ŝi sciis ke tio ĉi povus okazi?”

“Jes, nia selekta proceduro estas rigora. Ŝi komprenis la riskojn.”

“Ja! Kvazaŭ ĉiuj komprenas, kion signifas esti mistikulo. Do, kiel mi implikiĝas?”

“Implikiĝas? Ne pensu tiel. Tial ĉar ŝi volas ricevi instruadon.”

“Pri la katolika kredo?”

“Jes.”

“Kaj mi?”

“Nu, vi ĉar ni demandis al Episkopo Galloway kaj li sugestis vin. Vi havas fonon pri scienco, kaj, kiel li esprimis tion, 'neŝanceblan fidon antaŭ la konfliktoj de vivo kaj lojalon al la Eklezio'.”

“Vere? Li diris tion?”

Radcliffe ridetis. Li svingis la manon antaŭ la ekrano kaj la video de la juna virino ekkomenciĝis. Pastro Sanders spektis absorbite, fascinite, dum ŝi malrapide levis la manojn. Ŝiaj vortoj, traplektitaj per mallongaj spiraj ridoj, daŭris malpli ol minuto antaŭ ol ŝi levis la manojn super la kapo kaj haltis. Post kelkaj minutoj li aŭdis ŝian voĉon denove. Ĝi komenciĝis kiel basa, melodia “A”. Poste ŝi komencis kanti. “A, aaaa, aaaaaaaa,” falante en arpeĝojn kaj gamojn. Supren, malsupren. Mallaŭte komence, poste pli laŭte. Ĝi aspektas kiel Unuiĝo sendube. Feka Infero!

Radcliffe mansvingis denove kaj la video ĉesis. Li stariĝis.

“Tio estis Fraŭlino Arnaud post ŝia unua ekstazo-sperto, kion ekde tiam ŝi ŝajne povas eniri tute laŭvole. Inter la eventoj ŝi estas la normala persono kiu ŝi ĉiam estis, sed, kiel mi diris, senpacienca por ekhavi spiritan gvidon. Ŝi estas en la preĝa ĉambro nun, se vi volus renkonti ŝin.”

Alproksimiĝante la ĉambron, viro vestita en pur-ĉambra kompleto pasis. Tiu estis Jim Sears, unu el liaj paroĥanoj. Pastro Sanders sentis rideton entendiĝi sur la vizaĝo – por la unua fojo ekde lia enveno en la konstruaĵon.

“Jim!” li diris. “Kompreneble. Vi laboras ĉi tie, ĉu ne?”

“Pastro,” diris Jim.

Konstatante ke Radcliffe rigardas, Sanders kapklinis al Jim kaj diris “Mi vidos vin dimanĉon.”

Radcliffe atendis ĝis Sears preteriris angulon kaj diris “Mi supozas ke Sro Sears estas unu el via grego. Tio ja povus okazi, ĉu ne? Vidu, ne diskutu tion ĉi, eĉ kun dungato de Fluorsene Inc.”

“Li scias nenion pri kio okazis?”

“Ne. Li laboras pri alia projekto, kaj tre malmultaj el la Deopidem-laborantoj scias ĉion.”

“Ĉu vere? Nu, trankviliĝu, Doktoro Radcliffe, mi komprenas konfidencon.”

Por Pastro Sanders, Sophie estis perfekta paroĥano. Perfekta, kaj iel kariga, preskaŭ kompatinda. Ŝi estis amikema, helpema, regula, entuziasma, kaj super ĉio obeema. Kio, li pensis, estas bonŝanca. Se li ne intervenus sed lasus ŝin memdecidi, ŝi neniam forlasus la lokon. Ŝi ĉeestus la preĝogrupon, la liturgian grupon, la ekumenan grupon, Juston kaj Pacon, kaj la socian komitaton. Ŝi preĝus ĉe matena meso, ĉe anĝeluso, ĉe rozario, ĉe konfeso, ĉe antaŭdimanĉa meso, ĉe ĉiuj dimanĉaj mesoj. Post kelkaj semajnoj li devis paroli kun ŝi averte.

“Vi pasigas multan tempon ĉi tie, ĉu ne, Sophie?”

“Pastro, mi amas esti ĉi, estas mi vivo nun.”

Ŝia akĉento kaŭzis eksciton en lia brusto. Tra la ŝultroj sekvis molo, malstreĉa kaj karesa.

“Mi ne volas ke vi rezignu pri viaj studoj.”

“Sed Dio, Li mi kialo nun, Pastro.”

“Kaj Li donis al vi vivon vivendan, Sophie, kun ĉiuj respondecoj kiujn tiu alportas. Eĉ sanktulino Teresa de Avila studis. Kaj frotlavis plankojn. Ŝi kuiris, ŝi lavis telerojn kaj – kaj ŝi amis danci.”

“Ŝi danc?”

“Jes, ŝi ja. Vidu, Sophie, mi forte konsilas al vi reiri al viaj studoj. Memoru ke mi estas via spirita gvidanto. Aŭskultu min. Mi permesas al vi veni por matena meso. Tio ne estas tro – sed nur se ĝi ne konfliktas kun unu el viaj klasoj. Vi rajtas veni al konfeso sabate, sed dimanĉe mi volas ke vi venu nur al unu meso. Enorde?”

Li vidis ke por ŝi la frapo estis dolora, sed ŝi akceptis lian rezonadon – se ŝi ja ricevis religian alvokiĝon ŝi devas unue provi ĝin en la ĉiutaga vivo.

Sed el ĉio la provado plej malfeliĉigis lin. Tiu ĉi ne estis ordinara periodo de ekzamenado. Ordinare, junulo – ĝenerale ili estas junaj – venus al li, embarasita, iom timanta, sed ankaŭ esperplena. Ili babilus. Li parolus pri si mem kaj sia propra alvokiĝo. Pri kiel jaroj pasis antaŭ ol li estis certa. Pri kiel konfuza ĉio ĉi estis. Li aŭskultus la ulon kaj li aŭskultus ties kialojn. Li parolus, laŭ la insisto de la Episkopo, pri la malfaciloj de ĉastfraŭleco kaj, laŭ la insisto de la Episkopo, la rekompencoj de la ofero. Ili renkontus regule. Sed ĉiam li demandadus al si – ĉu tio ĉi estas nur ekpulso, provizora entuziasmo, kie estas la bonaj faroj, kaj, super ĉio, ĉu ĝi baziĝas sur solida katolika kredo?

Sophie Arnaud estis, li jam sciis, alia. Ŝia pieco estis ĥemie induktita, kaj Episkopo Galloway altrudis al li – Pastro Allan Sanders

– la taskon testi ĝin. Ŝi ne estis unu el la gregoj kiu subite sentis religian inspiron. Ŝi estis laboratoria rato, honeste dirite, en eksperimento kiu, oni devas konfesi, fuŝiĝis. Ĝi ŝanĝis la kompatindan knabinon ĝisfunde kaj permanente. Kiam ajn ŝi decidis preĝi, ŝi informis lin, ŝi ricevas la plenan beatan vidon. Laŭ ŝi, ŝi vidas Dion. Sed tio, kio plej maltrankviligis Pastron Sanders estis la fakto ke li konsentas kun ŝi.

Li neniam atendis ke li devos relegi ĉiujn tekstojn seminariajn pri kristana mistikismo: Avila, Siena, kaj Johano de la Kruco. Li petis al Sophie vortpentri siajn vidojn en plena detalo. Ĉio kongruis – estis ne-eviteble. Nenio misa. Tiu ĉi parto estis facila, sed Episkopo Galloway – tipe li – insistis pri la Siena testo, kaj Sanders ne povis rifuzi. Iun tagon li petis al Sophie eniri en ekstazon, kaj dum ŝi sidis en lia kabineto, ŝajne senscia pri sia ĉirkaŭo kaj rigardante al ĉielo per sia bela vizaĝo, li prenis nadlon. Li glutegis, kaj tuj poste ŝovis la nadlon tra la muskolo inter ŝia polekso kaj indikfingro. Ŝi ne reagis. Liaj manoj tremis kiam li provis ŝian alian manon. Denove, nenia reago. Ŝi ne sentis la doloron ĝis du horojn poste, kiam ŝi forlasis ekstazon.

“Pastro. Ho! Doloras,” ŝi diris, kun aperantaj larmoj. Ŝia mola akĉento ekscitis lin denove. Li forpuŝis la senton, decideme restanta ankrita. Sed lia koro rompiĝis, pro la grizaj okuloj sen plendo, sen kolero – nur simpla senjuĝa peto.

Episkopo Galloway insistis ke li venu al la episkopa domo ĉiun semajnon por informi lin pri la progreso de Sophie. Iun fojon li konsterniĝis kiam li trovis tie ankaŭ Georgon Radcliffe. Li sekvis la Episkopon en ties salonon kaj la du viroj rekomencis la konversacion kiun li interrompis. Tio estis por li lukto, kun fiero, ke li sentis sin ignorata.

Radcliffe ekrigardis lin de tempo al tempo ŝajne embarasita ke Sanders sidadis en la kulisoj. Finfine Episkopo Galloway decidis inkluzivi lin.

“Tiu ĉi konversacio komenciĝis per moraleco kaj la instruo de la Eklezio,” li diris ride, kaj ekrigardis al Radcliffe.

Tiu moviĝis en sia seĝo, kaj diris “Ne, mi simple konfuziĝas. Mi komprenas la vidpunkton de la Eklezio pri mortigo. La kvina ordono estas klara. Vi konfuzas min, tamen. Tio estas, mi ne komprenas. Kial vi aplikas ĝin ekstreme pri aborto kaj eŭtanazio, sed vi aprobas mortpunon?”

“Kion vi diras al tiu ĉi pagano?” diris Episkopo Galloway, kiu retren klinis sin kaj ridetegis.

Pastro Sanders sidis antaŭenklina kaj levis sian kafotason. Li malŝatis la situacion. Li venis por paroli pri Sophie. Ŝi gravis al li pli ol tiu ĉi frivola mokpikado. Ŝia spirita stato kaj moralrisko, pri tiuj li volis paroli. Li estis en nenia mensostato por filozofia boksado.

Li enspris.

“Nu, vi scias ke tio ne estas mia hejma tereno,” li diris, kubutoj surgenuje, “mi trarastas seminariajn notojn perkape” – la Episkopo ridetis – “Temas pri la memdefenda argumento, kompreneble. Kiu ajn aŭtoritato devas protekti ties civitanojn kontraŭ danĝera krimulo, kaj, se ekzistas absolute nenia alia vojo, ekzekuto pravigeblas. Sed neniuj senkapigoj.”

Radcliffe kaj Galloway ridis.

“Do vi aprobas tiujn nitrogenajn ĉambrojn kiujn uzas la Usonanoj?” diris Radcliffe.

“Aprobi estus tro forta vorto,” diris Sanders. “Mi ne subtenas tion, ke la krimulo suferu, elektra seĝo aŭ cianido, kio ajn. Kun nitrogeno ne estas traŭmato, mi aŭdis, eĉ estas eŭforio.”

Li kuntiris la brovojn.

“Malstreĉiĝu, Allan,” diris la Episkopo, “vi rajtas elpaŝi el la spoto.”

“Dankon,” diris Sanders.

“Do, kio estas via juĝo pri via juna gardatino?”

“Mia juĝo estas ke ŝi estas aŭtentika?”

“Hm, la vera afero? Kio pri demonismo?”

“Ne estas indikoj. Nenio kion ŝi diras konfliktas kun la instruoj de la Eklezio. Se estus demona iluzio estus almenaŭ sugesteto de herezo, sed estas neniam.”

“Do ŝi vidas Dion?”

“Prezentiĝas neniam kialo por diri ke ne. Tio estas la plej certa kion mi povas diri.”

“Mi supozas ke ŝi silentas pri la kaŭzo de siaj vidoj?”

“Mi kredas ke jes. Sed ŝi allogas multan atenton. Homoj ŝatas ŝin, vi scias. Ili parolas al ŝi.”

“Ŝi subskribis konfidencan kontrakton. Sed, plej bone rememorigi ŝin, Allan. Parolu al ŝi. Kio pri vi, Georgo?”

“Ho, mi estas certa pri tio ĉi. La vidoj venas el la cingulo kaj la efikeco de Pro-Deopidem. Pri tiu ĉi kazo nia intereso estas komerca. Se la efikoj ja permanentas, ne ekzistas estonteco por ĝi. Ni bezonas revendojn! Sed ŝi tamen devas diskreti. Se Pro-Deopidem restas ekster la foiro, ne povos esti iaj famoj.”

Kiam Pastro Sanders revenis al la preĝeja domo atendis lin registrita mesaĝo de Jim Sears. Damne; li volis paroli pri Fluorsene Inc. Ho Dio, jam sufiĉe da homoj ligas lin al ties sekretoj kaj nun Jim, la nura persono kiu devas scii ke interparolo ne eblas. Sed

kiam li retelefonis, Jim petis konfeson. Jes! Dankon, Jim! Li devus obei konfidencon. Tio estos sakramento. Tio ĉi estas lia profesio. Nek Radcliffe nek la Episkopo povus demandi kio estis dirita eĉ se tiuj sciis ke okazis la konfeso. Li diris al Jim ke li venu tuj. Pastro Sanders bezonis kunparoli, se ne pri sia maltrankvilo kiam li forlasis la domegon de la Episkopo, nur por paroli kun iu, iu kiu scias pri la drogo.

En la malgranda vizitantoĉambro, li almetis sian stolon kaj post minimumaj formalajoj ili komencis.

“Tio ĉi ŝancelas mian fidon, Pastro. Mi ekdubas por la unua fojo en mia vivo.”

“Vi volas diri per 'tio ĉi' Sophie-on.”

“Mi volas diri Pro-Deopidem, kaj la Deopidem studo antaŭ ol venis Sophie. Ĝi sukcesas, Pastro. Ĉiu el tiuj subjektoj vidis Dion. Ĉiu el tiuj estis pli virtoplena poste. Sed, hej, ĝi estas nur ĥemiaĵo, miksaĵo. Ĉu tio ĉi estas la sumo de nia kredo? Drogo? Nenio pli ol pocio en la cerbo?”

“Ĝi ne estus kredo se ni scius,” li diris ridetante. La vizaĝo de Jim falis.

“Okej, pardonon. Tio estis frivola. Unue, tamen, ĉu vi povas klarigi tion ĉi por mi: kiel vi priscias la aferon? Oni avertis min ne paroli al vi.”

“Ili paranojas, Pastro. Okej, mi ne laboras pri Pro-Deopidem, sed oni ne povas retenigi projektojn hermetikaj, homoj scias, aŭ konjektas. Sed neniu parolas ekster la laborejo. Tio rezultus en maldungaĵo – kaj proceso.”

“Kaj, kio pri Sophie?”

“Ŝi diris nenion al mi, Pastro.”

“Kaj al la aliaj paroĥanoj?”

“Mi kredas ke ne. Ili diras ke ŝi estas sanktulino.”

“Kaj vi ne.”

“Mi ja! Ŝi estas perfekta. Sed mi scias kiel ŝi atingis tion. Jen la diferenco. Per drogo, Pastro, ĥemiaĵo! Tio ĉi ekplodigas ĉion. Ĝi ekplodigas kredon.”

“Ĝi ja, kaj ne, Jim. Repensu pri la tagoj de la Sinjoro. Nenia moderna teknologio, nenia benzina motoro, neniaj laborŝparaj iloj. La vivo estis alia. Sed ĉu vi opinias ke la sperto esti homo sentiĝis alie? Ni manĝas, ni dormas, ni generas kiel bestoj. Tamen ni posedas memkonscion, tiun ĉi mirindan sperton esti vivantaj. Ni ridas, ni kantas, ni legas, ni dancas. Ni konscias pri ĉio ĉi, Jim. Sed la brutala realo estas tio, ke ĉe morto ĉio ĉesas.”

“Ĉu tion vi pensas?”

“Tiel estas. Ĉu vi opinias ke io okazas ene de la kapo de mortinta homo? Kaj se estas io post morto, neniuj revenis por diri al ni.”

“Kaj la Releviĝo?”

“La angulŝtono de nia Fido? Certe, ni havas Tradicion kaj Skribojn kiuj informas al ni ke ĝi okazis. Se vi volas tamen pensi science pri ĝi, ekzistas magra evidenco. Sed tio ne estas la punkto. Kristanismo donis al la mondo esperon. Jen mia kredo. Kaj mi kredas ke la Universo estis kreita. Eĉ kiel sciencisto mi malakceptas ian spontanen Grandan Eksplodon. Ĝi kontraŭas termodinamikon.”

“Vi estas sciencisto?”

“Diplomo pri Ĥemio antaŭ ol iri al seminirio.”

“Hu, mi ne sciis tion. Kaj pri drogoj kiuj ebligas al oni vidi Dion?”

“Avila vidis Dion. Sed kiel ni scias ke tion ne kaŭzis io en ŝia cerbo post senfinaj jaroj de preĝado kaj bonaj faroj?”

“Do ŝi ankaŭ estas fraŭdo!”

“Ne, Jim! Ŝi vidis Dion. Ni simple ne povas esti certa. Kaj ĉiam estos tiel – senkonsidere pri tio, kion scienco malkovros – ĉiam ĝi estos peso de probablecoj. Eble Pro-Deopidem kreas perfektan halucinon de Dio. Eble ĝi aliigas la cerbon same kiel faras preĝado. Eble ĝi kreas spacon en kiun povas veni Dio.”

“Spaco kio ebligas envenon de Dio?”

“Kial ne? Jim, kredo estas decido, ne teoremo. Kaj pri Sophie, jes, mi opinias ŝin sanktulino. Ŝi estas perfekta.”

Pastro Allan Sanders ne enamiĝis. Li faris ĉion por resti fidela al sia voto. Li disciplinis sin. Li evitis okazojn de peko. Li neniam mistrafis siajn ĉiutagajn preĝojn. Do li ne povis kompreni kial doloris tiom, kiam li aŭdis la novaĵon post unu semajno. Por ricevi ŝiajn pagojn kiel voluntulino, Sophie devi viziti la laboratorion unufoje en semajno por cerbo-funkcia takso. Je la tago de ŝia aranĝo, Allan Sanders ricevis telefonan alvokon de Fluorsene Inc. Sophie mortis dum la takso, ĉu li povus veni por fari lastan riton?

Oni gvidis lin en la malgrandan ĉambroon kiun li rekonis de la video en la estrarĉambro. Sophie kuŝis sur ĝuste la sama lito en kiu ŝi unue vidis Dion. La ĉambro estis en malordo. Reviviga ĉareto staris apud la lito kaj kardioplato, pendanta de ĝia kablo, atingis la plankon. Ĉirkaŭrigardante li notis la medicinajn ŝrankojn apud la muro, kaj la aron de gasaj cilindroj en unu angulo.

La lipoj de Sophie estis bluaj. Ŝia vizaĝo aspektis paca, eĉ eŭforia. Liaj manoj tremis dum li levis la stolon super sia kapo; li bezonis du provojn antaŭ ol meti ĝin sur siajn ŝultrojn. Li malfermis sian brevieron.

“En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Sankta Sprito,

Amen,” li komencis. “Per tiu ĉi sankta oleo, la Sinjoro helpu vin tiel ke, liberigita de viaj pekoj, li savu vin kaj levu vin.”

Kiam li finis li forprenis la stolon kaj paŝis en la koridoron. Li levis la okulojn de la planko por vidi Jim Sears alvenantan al li. Jim etendis la manon kaj li tenis ĝin.

“Tiel malĝoje, Pastro, ŝi havis antaŭ si la tutan vivon.”

Kio? Kial Jim elsputas tian gurditan sentimentalon? Sed poste li rememoris kie li estas.

“Dio devis ami ŝin por preni ŝin tiel frue,” li diris.

Jim premis lian manon.

Kiam li sidis en sia aŭtomobilo, Allan Sanders rigardis la etan paperpecon en sia mano. La fingroj tremis kiam li turnis ĝin kaj legis unuopan simbolon: “N₂”.

La cetero de la posttagmezo esti koŝmaro. Kio infere okazis? Ĉu Jim opinias ke Sophie estis murdita? Ĉu tion ne implicas la noto kiun li transdonis al li? Nitrogena asfiksio. Sed povus esti ke Sanders simple adicias unu kaj du post la mencio de Radcliffe pri la nitrogenaj ĉambroj la pasintan semajnon. Ĉu tiam ili provis lin por malkovri lian lojalecon? Li neniam fidis Galloway-on kun ties aplombo kaj falsa afableco, pli politika ol pastra. Ne, ne, ne. Formetu tiun penson. Kaj se ili komplotis ion, ili ne bezonis lin. Do kion scias Jim? Ĉu ili envolvis lin? Ne, Jim estas tro pia, li havas tro da skrupuloj; li neniam obeus, ĉu ne? Do kion li scias?

Tiel la horoj trenis sin. Li ne povis telefoni al Jim en la laborejo. Kaj, post la laboraj horoj, li devis lasi al Jim kaj la edzino fini vespermanĝon. Li iris en la kapelon kaj provis preĝi, sed ĉiun fojon kiam li fermis la okulojn li vidis ŝian molan pacan vizaĝon. La doloro en lia koro kreskis laŭe.

Je la oka li telefonis.

“Jim, jen estas Pastro Sanders.”

“Jes?” diris Jim. Lia voĉo ŝajnis streĉita.

“Pri la peco de papero.”

“Pri kiu peco de papero, Pastro?”

“La peco, Jim, kiun – ”

“Pastro,” Jim interrompis, “mi ne povas.”

“Vi ne povas? Vi ŝajnis certa.”

“Mi ne povas, Pastro, mi simple ne povas.”

“Estas enordo, Jim. Mi komprenas. Estas enorde.”

“Mi pardonpetas.”

“Okej, Jim. Estas enorde. Bonan nokton. Dio benu.”

Kiam li remetis la telefonon li sentis la plenan solecon de sia situacio. Pastro Allan Sanders havis nenian guston por mem-kompato, sed larmoj komencis plenigi la okulojn.

Brutala realo ĉirkaŭis lin.

Kaj Sophie jam lasis lian vivon.

Hju Rid

Ekzercoj el la Sabatrondo 2016

Dum la ĉi-jara Sabatrondo la du gvidantoj Ed Robertson kaj Jack Warren taskigis la partoprenantojn per interesaj lingvaj ekzercoj. Jen sube ni inkluzivas du el tiuj ekzercoj. Ĉu vi povas solvi ilin?

Ekzerco 1 konsistas el kvindek frazoj, ĉie el kiuj enhavas eraron. Via tasko estas korekti la frazojn al norma Esperanto.

Ekzerco 2 konsistas el dudek kvar frazoj kun mankanta vorto. Sub ĉiu frazo aperas kvar eblaj vortoj. Vi tasko estas elekti la plej verŝajnan por plenigi la vakan lokon en la frazo. Por helpi vin, estas la informo ke la sinsekvo de la unua litero de ĉiu ĝuste elektita vorto formas Esperantan frazon!

La solvojoj de ambaŭ ekzercoj aperas ĉe la fino de tiu ĉi numero.

Ekzerco 1: Ĉu eraro?

1. Bonan matenon! Kiel vi faras?
2. Kiel vi nomas?
3. Mi nomo estas Marta Medrano.
4. Kio estas tioj sur la tablo? Ĵurnaloj aŭ revuoj?
5. Kiuj tiuj estas dekstre la tablo? Bob kaj Tom?
6. Ĉu vi plaĉas skii en la montaro en vintro?
7. Mi surhavas brunaj ŝuoj.
8. Hieraŭ mi butikumas en la centro de la urbo.
9. Rigardu la granda bovaro! Estas almenaŭ mil bovoj!
10. Bonvolu donu mi varman tason da teo.
11. Kioma horo estas? Estas je la kvara kaj tri kvaronoj.
12. Kion libron vi volas? La ruĝan aŭ la bluan?
13. Ŝi eklernis Esperanton antaŭ de nur tri semajnoj.
14. Kie vi iros ĉi jare por ferii? Ĉu al Italio?

15. Kiaj ŝuoj vi aĉetis hieraŭ kiam vi iris al tiu vendejo?
16. Ĉu vi vidas la blanka kaj nigra katojn sub la tablon?
17. Jes, mi plaĉas trinki kafon kun lakton, sed sen sukeron.
18. Estas du dek tri personoj kiuj vojaĝos kun ni al Moskvo.
19. La sciencisto pensas per malsimpla, komplika problemo.
20. -Jen via kafo. -Nedankinde. -Dankon.
21. Estas treege varma, ĉu ne?
22. Ĉu vi voli paroli Esperanton tre flue kaj senhezite?
23. Iru norde al Stokholmo.
24. Kiujn bananojn vi volas aĉeti? Ĉi tion?
25. Estas bedaŭrinda, ke estas tiom da polucio en niaj riveroj!
26. Ĉu urĝas, ke la registaroj forigas la problemon de senlaboreco en la mondo?
27. Hieraŭ en loka ĵurnalo aperigis artikolon pri Esperanto kaj la Kastelo de Grésillon.
28. Li starigis la libron sur la breton, do nun la libro starigas sur la breto.
29. La aviadilo flugis de Londono ĝis Novjorko. Ĝi flugis trans la oceano.
30. Kie la salo estas? -Gi estas en la salumo, kompreneble!
31. La arbo hakataj de la hakisto estas abio.
32. Donu al mi iom da akvon, mi petas.
33. Per tiu katastrofo okazigis la morton de iu pasaĝero.
34. Ĉu vi vidis la pretigitaj valizojn? Mi ne povas trovi ilin.
35. Vi pravas kiam vi diras, ke du foje tri egalas kvin.
36. Ĉu vi preferas neĝon ke pluvon, aŭ male?
37. Ĉu vi estas laborema aŭ mallaborema? -Jes, mi estas mallaborema.

38. Vekiĝonte, Pablo iris al la necesejo.
39. Ĉu ŝi surmetis varmajn vestaĵon, ĉar neĝis kaj ventis? -Jes, per tio.
40. La birdoj, kiuj flugas super la granda domo, mi bone vidas.
41. Post la koncerto, la violonistoj agordis siajn instrumentojn por ludi.
42. Se mi surhavas flavan aŭ brunan ĉemizon, kuru norde!
43. La tero rondiras al la suno.
44. Venkinta teamo de futbalo estas teamo kiun oni venkis.
45. La kelnero metis siajn trinkaĵojn sur la tablon de la teraso.
46. Mi estas manĝema kaj mi manĝas ĉio kion mi povas.
47. Mi havas hejme du hundojn. Anstataŭ tio mi havas unu katon. Do entute mi havas tri dombestetojn.
48. Malgraŭ la pluvego, mi restis hejme la tutan matenon.
49. Leciono nia komencis je la oka kaj duono akurate.
50. Kies kapo estas granda? Tiu de la sciencisto aŭ tio de Paŭlo?

Ekzerco 2: Dirajoj kun mankoj.

- 1. Kie estas mia suko? Ĉu vi mem devas kreskigi la _____?**
i) ananasojn ii) bovinojn iii) pomojn iv) oranĝojn
- 2. Vi fariĝis filozofa, anstataŭ io _____.**
i) intelekta ii) eksterordinara iii) normala iv) serioza
- 3. Diru poste, Helena. _____ bonvolu porti ĉi tiun pleton.**
i) Intertempe ii) Antaŭtempe iii) Ĝustatempe iv) Printempe
- 4. Kaj li nun ŝvitas en plej nigra, plej _____ karcero.**
i) malluma ii) profunda iii) luksa iv) forgesita
- 5. Vi volas ke mi fariĝu _____, kie vi povas sensoifiĝi.**
i) dezerto ii) palm-arbo iii) kamelo iv) oazo

- 6. Ĉarma sinjorino, kiu _____ pri mankantaj akuzativoj.**
i) ĝojas ii) aplaŭdas iii) predikas iv) verdiktas
- 7. Paciencon, mi petas. Ĉio _____, ĉio. Ho, ve, Georgo...**
i) aranĝiĝos ii) oranĝsukos iii) kaosiĝos
iv) renversiĝos
- 8. Jes, por liberigi tiun kiun vi _____ akuzis.**
i) prave ii) kuraĝe iii) triviale iv) senkiale
- 9. Ilia patro laboris en la malproksima _____.**
i) Prago ii) kialo iii) ĉefurbo iv) supro
- 10. Mi ne rimarkis _____ neordinaran.**
i) pravigon ii) ion iii) trajnon iv) sintezon
- 11. Ĝi apartenas al komerca amiko de _____ Konrado.**
i) fratino ii) kukurbo iii) teroristo iv) onklo
- 12. Sed _____ estis la ferioj kaj ili estis liberaj.**
i) prahomaj ii) kemiaj iii) nun iv) senkialaj
- 13. Kial vi restas en la domo je tia _____ tago?**
i) bela ii) kuraĝa iii) trovita iv) sensuna
- 14. Sed ĉu vi ne rimarkis, kio _____ kiam ĝi venas?**
i) diris ii) eniris iii) tiris iv) okazas
- 15. Ni devas teni la okulojn _____.**
i) dirantajn ii) nefermitajn iii) tiritajn iv) spiri
- 16. Je tiu momento onklino Maria _____ kun la vespermanĝo.**
i) eblis ii) envenis iii) sovaĝis iv) luktis
- 17. La geknaboj ekzamenis la ŝtonajn murojn de la kelo, kaj _____ ilin.**
i) demandis ii) manĝis iii) frapis iv) malestimis
- 18. La ĝemeloj denove ludis _____ la domo.**

i) apud ii) malgraŭ iii) far iv) ĝirafe

19. Andreo kaj lia fratino _____ ekster la domo.

i) dungis ii) ĝis iii) restis iv) faris

20. Li adiaŭis la farmiston kaj la _____.

i) gvardistojn ii) eblon iii) fragojn iv) infanojn

21. La _____ estis tute malplena, kaj ne estas sekreta pordo tie.

i) ĝangalo ii) kelo iii) universitato iv) ĝeno

22. Andreo, kiu iris antaŭe, devis _____ la manojn por trovi la vojon.

i) farita ii) uzi iii) porti iv) lavi

23. Estis ankoraŭ mallume, sed la luno brilis tra la _____.

i) faruno ii) nuboj iii) pordo iv) truo

24. Tiam li malfermis tirkeston kaj _____ vipon.

i) aĉetis ii) elprenis iii) plenumis iv) damaĝis

Ed Robertson

La Landlimaj Fervojo

En Aprilo mi iris al kunveno de la Monklands Geographical and Travel Society (antaŭe ĝi nomiĝis la Geographical Society). Mi iris al la kunveno ĉar la temo interesis min – estis pri la landlimaj* fervojo. La virino kiu prelegis jam verkis librojn rilate al la fervojo. Ŝi ankaŭ montris lumbildojn pri ĝi kaj la konstruado. Je la fino de la vespero ŝi anoncis ke ŝi decidis organizi ekskurson uzante la novan fervojon. Tuj, mi decidis ke mi volis partopreni la ekskurson. La dato por la ekskurso estis la 30a de Aprilo.

Mi devis renkonti la aliajn partoprenantojn ĉe Airdrie fervojstacidomo, kajo 3 por trafi la vagonaron al Edinburgo (Waverley). Estis naŭ homoj entute. Kiam ni alvenis al Waverley (ĉirkau la deka matene) mi devis promeni al alia kajo por la landlimoj trajno (bedaŭrinde, ĝi nur havis du vagonojn). La ĝusta tempo por la foriro de la trajno estis proksimume kvin minutojn antaŭ la dek unua, sed estis prokrasto ĉar oni devis atendi stabanon kiu estis en alia parto de Waverley. Finfine, la trajno foriris malfrue, sed la vojaĝo estis interesa kaj pitoreska. La haltejoj inter Waverley kaj Tweedbank estas Brunstane, Newcraighall, Shawfair, Eskbank, Newtongrange, Gorebridge kaj Stow. La cel-loko de la trajno estis Tweedbank, kie la alveno estis je tagmezo. Post tio, ni ĉiuj iris al la restoracio (en Tweedbank) por tagmanĝi. Poste, ni ĉiuj estis libera por fari tion ajn, kion ni volis.

En Tweedbank mem ne estas multo por fari, sed oni povas promeni al Abbotsford House – la domo de Sir Walter Scott. Aliaj eblecoj estas trafi buson al Melrose aŭ Peebles kaj trafi aŭtobuson al Galashiels. Fakte, estis bus-haltejo kontraŭflanke de la restoracio kie mi tagmanĝis. Mi decidis reveni al la fervojstacidomo por forpreni horaron pri la landlimaj fervojo.

Bedaŭrinde, la stacidomono en Tweedbank nur estas por

stabanoj de Scotrail, ne por la publiko. Poste, mi trafis trajnon kaj eltrajniĝis ĉe Galashiels kaj finfine trovis la informon kiun mi deziris. Mi ne vidis multon de Galashiels ĉar mi vidis virinon kiun mi konis kaj ŝi kaj alia virino volis hejmen vojaĝi. Mi trafis la saman trajnon sed mi eltrajniĝis ĉe Waverley kie mi trovis la horaron pri la Borders Railway.

Certe estis tre ĝuinda tago kaj mi farus la vojaĝon denove. Mi aŭdis je la Skota Novaĵo antaŭ ne longe ke la fervojo nun estas unu-jaraĝa. Mi rekomendus la sperton por vojaĝi sur la fervojo kaj mi volus fari ĝin denove post la Brita-Skota Kongreso venont-jare.

Sheila Henderson

** Noto de la kunredaktoro. La termino 'The Borders' en la skotangla aludas al la regiono aŭ al la distriktoj apud la skotlanda landlimo kun Anglio – border = landlimo. La vorto, en tiu ĉi uzo, havas tre specifan signifon, malfacile rekte tradukeblan en Esperanton. Do 'landlimaj fervojo' iom koncize reprezentas la esprimon 'fervojo de la landlimaj distriktoj'.*

Noto de la kunredaktoro: John Francis foje partoprenis programeron de la Glasgova Esperanto Societo laŭtitolon "Libravole". Dum tiu, individuoj laŭtlegas propran kvinminutan kontribuon, nome ion ajn ĝenerale rilatantan al libroj. Serĉinte en malnovaj dosieroj por io alia, mi hazarde trafis tiun ĉi tekston kiun John transdonis al mi kiam mi ankoraŭ estis sekretario de la Societo. Mi ĝojas reprodukti ĝin sube.

Heroinoj kaj Heroinoj

Kiam mi havis eble dek kvar jarojn, mi devis legi *Pride and Prejudice*. Legi, kaj poste resumi en sufiĉe dika kajero. Do mi legis, kaj resumis, supozeble kun seka ĝentileco, ĉar kiel mi povus ŝajnigi entuziasmon pri verko kiun mi trovis teda, senkolora kaj vaka?

Mi ne hontas pro tio: la verko estis tute nekonvena por knaboj kies preferata legaĵo enhavas aventurojn, tumulton, batalojn kaj kolorplenan ekzotecon. Eĉ iom poste, kiam mi ekkonstatis ke Jane Austen meritas seriozan taksadon, ŝia baza intrigo ĉiam ŝajnis al mi speco de kvadrilo en kiu la pli junaj karakteroj fine aranĝiĝos laŭ konvenaj geedziĝaj paroj.

Fine mi konstatis ke en ŝia limigita mondo la plej subtilaj nuancoj kiuj ekzistas en homaj interrilatoj speguliĝas tiel verece ĉar ŝia rafinita lingvaĵo permesas tion. Antaŭ du-tri jaroj mi aŭkultis dum televida prezento la argumenton inter Moŝtino Katerina kaj Elizabeta kun eĉ pli da plezuro ol kutime ĉe Jane Austen prezento: ĉiu individua vorto kun preciza signifo, kaj ĉiuj aranĝitaj por doni maksimuman kolektivan klarecon. La signifoplena elokvento de la antagonistoj des pli trafis pro ĝia kontrasto kun la kutimaj sendisciplinaj televidaj elverŝoj de vortoj dirantaj preskaŭ nenion, kaj ambaŭ antagonistoj konvinkis, ĉar ŝia lingvolerto povis montri la subtilajn variaĵojn de pensado kiujn ŝi perceptas en ordinaraj homoj. Do ŝia lingva uzo ne estas la lingvo de ĉiutaga konversacio? Vere, kaj same ĉe la blanka verso de Ŝekspiro, sed ambaŭ aŭtoroj

prezentas pli kredeblajn kaj kompreneblajn karakterojn ol adeptoj de la “Can’t-get-me’ead-rand-it”^{*} skolo.

Do ĉu mi rajtas rigardi aŭtoron kiel ankaŭ heroinon?

Nu, kiaj estas tipaj literaturaj heroinoj? La plej tipa tipo ekzistis dum la 19a jarcento, ĉar nur iomete modifita ĝi ekzistis antaŭ kaj post tiu tempo: oraj haroj; sed tio ne sufiĉis; do haroj el ŝpinita oro. Bluaj okuloj; sed tio ne sufiĉis; do violkoloraj okuloj – kaj la strebado al eĉ pli drama violeco fine povis konduki al purpuraj. Kaj ĉiam tiu eta mano, tiu eta piedo, kaj tiu etega talio. Do sume: pigmeoj kun drataj haroj kaj okuloj kiujn ŝajne ŝminkis boksaj gantoj. Kaj ili havas nur unu karakteron: delikatan, fizike kaj mense kaj pense. Tio pli-malpli daŭris ĝis la filmoj de la frua 20a j.c. La celo ĉiam estis belo, kvankam la plej bela el la stelulinoj de la tridekoj inspiris de kritikisto vere memorindan metaforon: “Hedy Lamarr had all the impact of a soft-centred chocolate”^{**}.

Kaj la filmoj spegulis *fikcian* literaturon. Kiam temis pri biografio, ambaŭ medioj kempreneble devis ĝis certa grado bildigi realan personon, sed la krea medio, fikcio, rajtis uzi la imagpovon por inventi la perfektan heroinon, kun rezulto ke ni memoras neniujn. Kaj la moderna provo anstataŭi la negativajn belulinojn rezultas nur je heroinoj kiuj devas esti pli virece heroaj ol la herooj; do ĝis nun pli virecas al heroinas.

Dume, estas nur unu heroino de la deknaŭjarcenta literaturo kiu impresis min, kaj ŝin al aŭtoro prezentis simple kiel agrablan (“comely”) junan virinon, kaj dum la tuta longa romano, *La Klaŭstro kaj la Kameno* de Charles Reade, la sola ripetita trajto estas en la vortoj de ŝia amanto, Ĝerardo: “Pomo de oro en reto de arĝento”. (Alivorte, kaŝtankoloraj haroj). Tamen, antaŭ la fino, mi, la leganto, preskaŭ mem enamiĝis je Margaret Brandt, kaj tion mi ne povas diri pri iuj heroinoj de Dickens aŭ Thackeray aŭ Trollope aŭ Scott.

Kaj la heroinoj kreitaj de mia aŭtoro-heroino? Nu, ankaŭ ilia fizika allogo ne vivas en la memoro, sed tio estas ĉar nur iliaj karakteroj gravis al Jane Austen. Aŭ ĉu eble, ĉar ŝi estis virino, ŝi indiferentas pri la reagoj de viraj legantoj al heroina belo?

Se jes, kial ŝi restas unu el miaj heroinoj?

John Francis

** Ĉi tie John mokas parolmanieron de seneduka homo kun londona akĉento. La signifo de la frazeto estas "Mi ne povas kompreni ĝin", aŭ tute laŭvorte, "Mi ne povas igi mian kapon ĉirkaŭ ĝi".*

*** "Hedy Lamarr posedis la tutan imponon de molcentra ĉokolada bonbono".*

Pordo al Miraklo

Ofte oni aŭdas ke Esperanto malfermas pordojn.

Sed laŭ mia lastatempa sperto, ĝi povas eĉ helpi trovi pordojn.

Kaŝita pordo estis mia celo la lastan jaron kiam mi vizitis la Kaŭkazan landeton de Armenio pro mia laboro. Mi pasigis du semajnojn – unu dum oktobro kaj unu en novembro – en la fascina ĉefurbo Erevano, bela vivanta muzeo de frua dudek-jarcenta arĥitekturo, kaj dum la dua vizito mi plaĉe havis kelkajn liberajn tagojn por esplori kaj vojaĝi.

Unu vidindaĵo kiun mi trovis leginte pri Armenio estis eble la plej stranga aĵo pri kiu mi iam aŭdis – truo en grundo.

Kompreneble, truo en grundo estas ne notinda, aŭ alvojaĝinda de la alia flanko de Eŭropo. Se mi volus viziti truon en grundon, mi povus fari la ĝardenumadon volata de mia edzino.

Sed ĉi tiu truo en grundo ne estis kutima grundtruo. Ĝi estis laŭvorte kaj figure, sur tute alia nivelo...

Antaŭ multaj jaroj, armeniano nomiĝe Levon Arakelyan ricevis mesaĝon de Dio, dumlabore en Rusio. Dio diris al li ke li, iun tagon, faros miraklon.

Poste, dum la 80aj jaroj, kiam li revenis al la familia domo ĉe la norda limo de Erevano, Levon ricevis alian mesaĝon de alia alta aŭtoritato: sia edzino. Ŝi volis spacon sub la domo por malvarmigi la terpomojn.

Do Levon fosis truon.

Sed li ne ĉesis. Li daŭre kaj daŭre fosis, fosante tien kaj tien, sentante ke Dio gvidis lin kaj ĉiujn el liaj faroj. Pli kaj pli profunde li fosis, tra roko dura kaj mola, kun simplaj iloj, dum pli ol dudek jaroj.

Ĝi iĝis lia misio, lia vivkialo. Kaj li fosis ĝis li finfine kreis sepnivelan tunelsistemon, kun ŝtuparoj, sanktejetoj, kaj eĉ – la sola koncesio al moderna teknologio – elektraj lumetoj.



Kvankam Levon bedaŭrinde mortis antaŭ kelkaj jaroj, lia familio kreis modestan muzeon per la kavernoj, pri kiu mi trovis kelkajn menciojn en la interreto. Kiam mi trovis tiujn recenzojn kaj blogafiŝojn pri ĉi tiu unika kaj nekutima allogaĵo, mi sciis ke mi devis trovi ĝin.

Tio, tamen, ne estis facila.

Bonŝance, mi veturis en mia dua vizito al Erevano kun rusparola kolego, kio tre utilis en Armenio – lando kun fortaj ekonomiaj kaj kulturaj ligoj kun Rusio, kaj en kiu ĉiu enloĝanto parolas la rusan ekde tre juna aĝo.

La mencioj de la kaverno de Levon estis malmultaj kaj ofte malnovaj, sed laŭ mia kompreno la atingmetodo estis facila. Oni simple bezonus preni taksion al la kvartalo Arinj, kie ĉiu sciis pri Levon kaj povus direkthelpi.

Mia dubo ekkreskis, tamen, kiam nia taksiŝoforo haltis post

mallonga vojaĝo norden, tra konkretaj kaj polvaj stratoj, kaj anoncis ke ni estis en Arinj. Ĝi estis tipa sceno de orienta Eŭropo kaj tre malsama ol la modernstila, bone planata urbcentro. Maltrankvilige, li neniam aŭdis pri Levon kaj lia subtera miraklo, kaj same malsciis homoj en proksima vendejo.

Se ili ne sciis, laŭ la retpaĝoj kiujn mi legis, tial pluaj demandadoj ĉirkaŭ la loko tute ne helpas, do estis rapida kaj malklimaksa fino de nia aventuro.

Ĉu la muzeo de Levon estis mistero? Ĉu ĝi estis kompleksa kontraŭturista ŝerco? Ĉu ĝi estis tiom malfama ke neniu sciis pri ĝi malgraŭ la enreta informado?

Danke, savvenis Esperanto.

Pli malfrue dum la semajno, mi kunvespermanĝis kun la amikema kaj bonvenema esperantistaro de Erevano, kiun mi unue renkontis dum mia oktobra vizito. Mi klarigis la rakonton de nia ege malsukcesa esploro al la kaverno de Levon, pri kiu ili aŭdis iomete sed sciis malmulte.

Ili serĉis informon kaj demandis amikojn, kaj trovis nian eraron. Anstataŭ iri al Arinj, oni devis iri al la verŝajne malsama sed rekte apuda kvartalo de Aran-Arinj. Kaj plej feliĉe, du el la lokaj esperantistoj proponis iri kun ni, ĉar la kaverno interesas laŭ ili ankaŭ.

Do, la sekvontan posttagmezon, ni renkontis en la urbcentro kaj prenis unu el la ĉieestaj komunaj aŭtobusetoj kiu fundamentas la lokan publikan transportadon en Armenio kaj tra la pli vasta regiono. Ĉe Aran-Arinj, ni tuj trovis taksion kies ŝoforo precize sciis la domon de Levon, kaj tien ni iris.

Laŭ kelkaj mallarĝaj flankstratoj ni iris, tra reto de malaltaj ruĝstonaj domoj, kaj post nelonga tempo ni atingis nian destinaĵon:

bela eta domo kun malgranda ŝildo super la pordo, diranta en la armena kaj la angla: “La dia subteraĵo de Levon”.



Niaj esperantaj amikoj frapis la pordon kaj babilis armene kun la respondinto, kaj tre baldaŭ ni bonveniĝis en la hejmon de la familio de Levon, kaj komenciĝis rondiro estrata de Nune, la nepino de la legenda kreinto. Ŝi studis lingvojn en unu el la erevanaj universitatoj kaj parolis perfektan anglan, kaj tre feliĉe kaj sperte gvidis nin en la nekredeblan subteran kavernaron de Levon...

Tuj, la atmosfero ŝanĝiĝis, de hela aŭtuna varmeco al subtera malvarmeco kaj malforta lumo. Laŭ malvastaj koridoroj kaj krutaj

ŝtuparoj, ni apertabuŝe miris je la bele detala skulptitaĵo.

Tute malsufiĉas diri ke ĝi estis mirindaĵo – tiaj aĵoj ofte kreiĝis de amasaj manoj. Sed ĉi tiun kavernaron kreis nur unu homo dum ege longa tempo. Ĝi estis malrapida, malfacila paŝaro, po centimetro, per ĉizilo, ĉiun tagon, dum pli ol du jardekoj. Levon laboris kun nenia aprobo, nenia rimarko, nur trankvile kaj laŭ siaj propraj kialoj.

Sed kiuj kialoj? Ĝi estis ne nur por enmeti la terpomojn – kiu povus plenigi sep nivelojn da kavernoj per terpomoj? Pli ol ĉi tio, li respondis al voko de Dio – sed kial Dio volis ĝin? Tio ankaŭ ne klariĝis dum nia vizito.

Sed kvankam la kialo kial Levon daŭre fosis ne klariĝis, mi ne certis ke ĝi gravis. Pli gravis la fakto ke ĝi okazis – estis testamento al la lerto, pacienco kaj laboro de unu homo, estis ekzemplo de plenumo de revo, celado al vizio. Se la rezulto mem estas tiom bizara, bela kaj senspiriga, kiu zorgis pri la kialoj?

Mi eliris el la modesta domo de la Levon familio kun sento de miro kaj respekto ke nur unu viro faris tian kreaĵon. Dum vojaĝoj, oni ne ĉiam bezonas eksplikojn por ĉio, kion oni vidas. Male, oni fojfoje devas akcepti ke demandoj kaj malcertaĵoj daŭros, kaj tio estas parto de la miro de la mondo.

Sed unu demandon mi ne povas forpuŝi: precize kiom preterkompare bongustaj estis la terpomoj de la edzino de Levon?

Simon Varwell

Solvoj de la Ekzercoj

Ĉu eraro?

1. Bonan matenon! Kiel vi fartas? **2.** Kiel vi nomiĝas? **3.** Mia nomo estas Marta Medrano. **4.** Kio estas tiuj sur la tablo? Ĵurnaloj aŭ revuoj? **5.** Kiuj tiuj estas dekstre **de** la tablo? Bob kaj Tom? **6.** Ĉu vin plaĉas skii en la montaro en vintro? Aŭ **al** vi. **7.** Mi surhavas brunajn ŝuojn. **8.** Hieraŭ mi butikumis en la centro de la urbo. **9.** Rigardu la grandan bovaron! Estas almenaŭ mil bovoj! **10.** Bonvolu donu **al** mi varman tason da teo. **11.** Kioma horo estas? **Estas la kvara kaj tri kvaronoj.** **12.** Kiun libron vi volas? La ruĝan aŭ la bluan? **13.** **Ŝi eklernis Esperanton antaŭ nur tri semajnoj.** **14.** Kien vi iros ĉi jare por ferii? Ĉu al Italio? **15.** Kiajn ŝuojn vi aĉetis hieraŭ kiam vi iris al tiu vendejo? **16.** Ĉu vi vidas la blankan kaj nigran katojn sub la **tablo**? **17.** Jes, min plaĉas trinki kafon kun lakton, sed sen **sukero**. Aŭ **al** mi. **18.** Estas **dudek** tri personoj kiuj vojaĝos kun ni al Moskvo. **19.** La sciencisto pensas **pri** malsimpla, komplika problemo. **20.** -Jen via kafo. -Nedankinde. -Dankon. **21.** Estas treege varme, ĉu ne? **22.** Ĉu vi volas paroli Esperanton tre flue kaj senhezite? **23.** Iru norden al Stokholmo. **24.** Kiujn bananojn vi volas aĉeti? Ĉi tiujn? **25.** Estas bedaŭrinde, ke estas tiom da polucio en niaj riveroj! **26.** Ĉu urĝas, ke la registaroj forigas la problemon de senlaboreco en la mondo? **27.** Hieraŭ en loka ĵurnalo **aperis** artikolon pri Esperanto kaj la Kastelo de Grésillon. **28.** Li starigis la libron sur la breton, do nun la libro **staras** sur la breto. **29.** La aviadilo flugis de Londono ĝis Novjorko. Ĝi flugis **super** la oceano. **30.** -Kie la salo estas? -**Ĝi** estas en la salujo, kompreneble! **31.** La arbo **hakata** de la hakisto estas abio. **32.** Donu al mi iom da **akvo**, mi petas. **33.** Per tiu katastrofo **okazis la morto** de iu pasaĝero. Aŭ **Tiu ĉi katastrofo okazigis la morton...** **34.** Ĉu vi vidis la pretigitajn valizojn? Mi ne

povas trovi ilin. **35.** Vi pravas kiam vi diras, ke du **oble** anstataŭ **foje** tri egalas kvin. **36.** Ĉu vi preferas neĝon **ol** anstataŭ ke pluvon, aŭ male? **37.** Ĉu vi estas laborema **ĉu** anstataŭ **aŭ** mallaborema? -Jes, mi estas mallaborema. **38.** Vekiĝinte, Pablo iris al la necesejo. Aŭ Vekiĝonte, Pablo iros al la necesejo. **39.** -Ĉu ŝi surmetis varmajn vestaĵon, ĉar neĝis kaj ventis? -Jes, **pro** anstataŭ per tio. **40.** La birdojn, kiuj flugas super la granda domo, mi bone vidas. **41.** Antaŭ anstataŭ post la koncerto, la violonistoj agordis siajn instrumentojn por ludi. **42.** Se mi surhavas flavan aŭ brunan ĉemizon, kuru norden! **43.** La tero rondiras **ĉirkaŭ** antsataŭ al la suno. **44.** Ventita teamo de futbalo estas teamo kiun oni venkis. **45.** La kelnero metis siajn trinkaĵojn sur la tablon de la teraso. **46.** Mi estas manĝema kaj mi manĝas ĉion kion mi povas. **47.** Mi havas hejme du hundojn. **Ankaŭ aŭ aldone al tio** mi havas unu katon. Do entute mi havas tri dombestetojn. **48.** **Pro** anstataŭ malgraŭ la pluvego, mi restis hejme la tutan matenon. **49.** Leciono nia komenciĝis je la oka kaj duono akurate. **50.** Kies kapo estas **pli granda**? Tiu de la sciencisto aŭ tio de Paŭlo?

Diraĵoj kun mankoj

1. iv) oranĝojn. **2.** iii) normala. **3.** i) intertempe. **4.** ii) profunda **5.** iv) oazo. **6.** iv) verdiktas. **7.** i) aranĝiĝos. **8.** iv) senkiale. **9.** iii) ĉefurbo. **10.** ii) ion. **11.** iv) onklo. **12.** iii) nun. **13.** i) bela. **14.** iv) okazas. **15.** ii) nefermitaj. **16.** ii) envenis. **17.** iii) frapis. **18.** i) apud. **19.** iii) restis. **20.** iv) infanojn. **21.** ii) kelo. **22.** ii) uzi. **23.** ii) nuboj. **24.** ii) elprenis.

Kalendaro

Enbritaj Eventoj

novembro 2016

11 - 13. novembro

[Junulara Aŭtuna Semajnfino](#) en Bath, Britio. Junularo Esperantista Brita, JEB invitas vin al Esperanto-renkontiĝo en Bath, urbo konata pro ĝia bela arkitekturo kaj kulturaj heredaĵoj! La renkontiĝo inkluzivos gvidan urborigardadon, komunan manĝadon, kaj kongreseton. Inf.: Ariel Bonkorpa, verdkorpa@gmail.com

Internaciaj Eventoj

oktobro – decembro 2016

29. oktobro - 1. novembro

[20-a Andaluzia Kongreso de Esperanto](#) - en Antequera (Málaga), Hispanio. Andaluzia Esperanto Kongreso, Temo: "Esperanto kaj Naturo, Ĉielo kaj Tero". Prelegoj, ekskursoj, Torcal, Cuevas de Menga, Observatorio, ktp Antequera geografia centro de Andaluzia. Inf.: Andaluzia Esperanto Unuiĝo (AEU) rete: angelarquillos@gmail.com.
Blogejo: andaluciaesperanto.blogspot.com.es

11 - 12. novembro

[Internacia scienca Esperanto-rumana kolokvo](#) - en Timișoara, Rumanio. Esperanto-Asocio de Rumanio, kunlabore kun la Okcidenta Universitato de Timișoara proponas, pere de tiu ĉi kolokvo, estigi komunikponton inter esploristoj kaj universitatanoj el diversaj landoj pere Esperanto, sed ankaŭ krei malfermiĝon de nia lando al la monda Esperanto-agado. Estas invitataj partopreni la kolokvon universitatanoj, esploristoj, studentoj, ĉu esperantistoj, ĉu adeptoj de la lingvo, per prelegoj el siaj fakoj. La laborlingvoj estos la rumana kaj Esperanto. Inf.: Aurora Bute, Timișoara, O.P.1, C.P. 351, RO-300790, Rumanio. Rete: aura.bute@gmail.com

3. decembro

[Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio 2016](#) en Stolpen, Germanio. Trarigardo de la urbo kaj kastelo, vizito de Kristnaska merkato kaj gustumado de kolbasoj, kafumado en kafejo. Inf: [e-mentalprago\(ĉe\)seznam.cz](mailto:e-mentalprago(ĉe)seznam.cz)

